



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

Fratelyco, Esperanta Societo esprimas, pere de NIA Vivo al ĉiuj ĝeklubanoj kaj al ĉiuj esperantistoj sian plej koran deziron, ke la nova jaro 1934 estu plenfeliĉa al ĉiuj.

MIA PATRUJO

Mia patrujo,
Tuta mondujo,
Land' unueca de l' plena potenc'.
Ĉies animo
En la senlimo
Spiras per ĝia eterna esenc'.
Brilaj kaj belaj
Aroj tremstelaj
Etaj polvojoj de l' spaca grandeg'
Estas en tuto
Pri l' Absoluto
Mia amata paĝeto por leg'.
Mi rigardante,
Ĝoje kaj kante
Dronas en ilin per mia anim'.
Maro plej vasta,
Pura kaj ĉasta,
Kie mi banas min ĉiam sen tim'.
Sankta baptujo,
Kie dum tujo
Pens' unuiĝas kun glora kaŝit'.
Dio kaj ĉio,
Ĉio kaj mio
Nedivideblas en monda spirit'.

VSEVOLOD LIBERT.

MIA DESTINO

(Imitaĵo je A. Tolstoj)

De l' du tendaroj mi ne estas batalanto,
Sed nur okaze alveninta gast'.
Por vero ĉiam pretas mia glav' kaj kanto
Kaj de l' ŝipet' refleksiĝema mast'.
Sed kun la ambaŭ min destinis mia sorto
Sekrete min destinis al disput'
Ĉar sentas mi-nur parte pravas ĉies vorto
Kaj parte ĝi eraras antaŭ tut'.

U. LIBERT.

TRIA SINJORO

Mia koro preĝi volas
Kaj ridegas menso jen.
Mi batalas, sango bolas
En malvarmo de l' malplen'.
Mi ja scias-fali devas
De l' sinjoroj du servant',
Sed la tria fluge mevas
Min savanta reva kant'.

U. LIBERT.

TRA LA MONTJOJN

NOKTA SERENADO

Teraso de la Kazino ĉe la eleganta sanigejo.
Vizaĝoj malsanaj, lacigitaj de la vivo: kiu serĉas
la bonfarton en la pirinea klimato kaj en la akvoj
de la sanigaj fontanoj.

Somera nokto, rava, bonodora. La orkestro aŭ-
digas belajn melodiojn sed iu enuas kaj petas
gajajn dancmuzikon. La ludistoj obeas kaj ludas
mallaŭte, eĉ kun timo. Ne estas la nokto propra
por maldelikataj melodioj. Tiel ŝajnas al la artis-
taro, kaj ankaŭ sendube al tiu ĉi sola virino, kiu
anstataŭ supreniri ĝis la teraso de la Kazino, (plena
de lumo, de ridegoj kaj babiladoj senrespekto al
la beleco de la nokto), restas sube sur benko de la
ĝardeno preskaŭ nevidebla pro la arboj. Ne tiel
apud la Kazino ke ŝi aŭdas la homan bruon (kiun
ĉi nokte ŝi timas pli ol ĉiam) ne tiel malapud ke
ŝi ne povas aŭdi la dolĉajn melodiojn de la or-
kestro.

Kaj tie, sidanta sola (sola restas jam de longaj
jaroj) ŝia animo estas ensorĉita per la bela kaj la
ravaj melodioj, kaj ŝi revas. Revas pri aliaj mon-
toj kaj alia nokto en kiu ŝi revis pri idealoj kiujn
poste vidis rompita, kaj ŝia rememoro estas pres-
kaŭ gaja. "Ankaŭ ŝi havas koron, tial ke ankaŭ
ĝi doloras". De tempo al tempo virino tremas,
estas kiam la noktan poezion rompas la dancmu-
ziko. Denove reĝas la silento. Daŭrigas siajn re-
vojn la sola virino. Ĉu gajaj, ĉu malgajaj estas
ŝiaj revoj? Ŝiaj lipoj ridetas kvazaŭ ŝi vidus ion,
aŭ iun tre amatan, sed ŝiaj manoj premas unu la
alian en gesto de muta doloro.

Post kelkaj minutoj de silento alvenas al ĝardeno viraj, puraj, koncizaj la klaraj sonoj de violono, kiu komencas tre konatan "Nokta Serenado". Tiu ĉi serenado, kion signifas en la vivo de la malgaja vojaĝantino? Sendube ion tre kruelan, tial ke, kiam ŝi aŭdis la unuajn taktojn, levigis rigida, tremante, kiel por forkuri de io, kaj poste falis sur la benkon venkita en senkonsola ploro tragedia kaj mallalita.

Malgaja virino! Alian antaŭan nokton, someran ankaŭ (kaj ankaŭ kiel ĉi tiu, klaran kaj faritan por revii) dum alia violono ludis, por ŝi sola, la saman melodion, ŝi revis pri tio kion viro, kiu ludis la violonon promesis al ŝi... Poste la revoj restis nur revoj. Ilin florblovis unue la vivo, ĉiam kruelaj por la geamantoj, poste la morto, ankaŭ kruela por kiu multe esperas de la vivo. Sed virino ankaŭ vivas, sen ridoj, sen kantoj, kiel liro rompita. Ankaŭ vivas kun ĉi tiu melodio en la koro, koro kiu estas pli sola, ol ĉiam en tiu ĉi somera bonodora nokto aŭdinte la belajn melodiojn de la orkestro, kiu rememorigis tiom da malgajaj revoj en la malfeliĉa vojaĝantino. Vojaĝantino ĉiam, ĝis kiam (trans la morto) atingos ŝian veran patrujon, kie LI atendas ŝin. Kiam ŝi komencos tiun lastan vojaĝon la plej bela adiaŭkanto per sia funebra ceremonio estos tiu ĉi "Nokta Serenado", kiun nun la virino aŭdas plorante sur benko diskrete nevidebla en la ĝardeno de la eleganta sanigejo.

RALIP SALLUMART.

Jaca.

LERTA SOLVO

En iu vilaĝo el Katalunio, pri kies nomo mi ne volas rememori, loĝis antaŭ multaj jaroj paroĥestro, kies spriton kaj diraĵojn plenajn je sagaceso ankoraŭ oni komentarias, kiel tiujn de Quevedo; li estis vivanta viro al kiu, kredeble oni alkalkulis okazintaĵojn kaj spritaĵojn de aliaj, sed estas vero, ke li ekzistis kaj estis realla vivanta estaĵo; li estis, kiu solvis, per sufiĉe sprita solvo, la tre gravan problemon, kiun oni provagis al li kaj kiun mi rakontos al vi. Iafoje, li ricevis prelatan viziton de la Episkopo de leparthio al kiu li apartenis; li pretiĝis ricevi kaj regali lin ĝentile, kiel meritis la alta rango de la vizitanto, li regalis lin per sufiĉega festeno, al kiu ĉeestis aliaj ĉefaj personoj el la vilaĝo.

Ekzistas en Katalunio, ia kutimo; kiel devigita manĝaĵo en festeno, oni devas prezenti rostitan kokon; la gasto devas dispecigi ĝin per forkegoj kaj poste disdoni ĝin al la kunmanĝantoj.

La Episkopo konis tiun kutimon kaj ankaŭ la sagacecon de nia paroĥestro; li volis fari uzon el la okazo por provi ĝis kie atingis tiu vigla kaj ruza imago; kiam alvenis la solena momento honoro la kokon, la paroĥestro liveris la forkegojn al la Episkopo por ke li plenumu lian mendon, sed la Episkopo redonis ilin al la paroĥestro dirante, ke li honoris lin kaj pro tio li devis dispecigi la kokon, kondiĉe ke ĉio, kion li faros sur la kadavro, oni farus al li sur lia vivanta korpo; grava estis la premo de nia paroĥestro kaj malgaje li prenis la forkegojn, kiuj estus liaj turmentaj iloj; ĉiuj gastoj avide rigardadis la movojn de la ĝenita viro, neniu kuraĝis paroli ĉar la situacio estis tre malfacila kaj ŝajne sen solvo per kiu ne suferu la korpo de nia heroo, kiu kun forkegoj en manoj atente malgaje

rigardadis la pladon, kie kuŝis la mortinta koko; li estis altrudita dispecigi kaj disdoni ĝin; li turnigis la pladon kaj avide observis la besteton kaj, kiam li decidis komenci sian laboron jetiĝis malantaŭen nia paŝto, kiel se li rememorus pri tio, kion li devus suferi pikante la kokon; poste li gratis sian kapon, kiel se li serĉus solvon al la problemo, kiu estis nesolvebla; li turnigadas kaj malgaje rigardadas la pladon; li subite gajis, batis la frunton per la mano, kiel se li tuj inspirus kaj forjetinte la forkegojn, prenis kokan kruron, per maldekstra mano kaj li enigis la ringan fingron rigida en la... en tio kion vi jam scias kaj eltirinte la fingron li suĉis ĝin ĝue kaj turnante sin respektelene al la Episkopo, metis sin en indeca pozo, meze de la ridadoj de la ĉeestantoj, dirante: Mi jam estas tute preta, Episkopa Moŝto.

EMILIO BRUQUETAS.

el la Rondo «La Unua»

VORTOJ DE KOMENCANTOJ

ĈU VI ESTAS ESPERANTISTA?

Ofte oni vidas personojn kiuj portas kvinpintan verdan stelon. Tio signifas ke tiuj personoj estas esperantistoj, aŭ pli bone dirite, ili parolas Esperanton, ĉar "ne ĉiuj kiuj parolas Esperanton estas esperantistoj". Estas multaj personoj kiuj ne vidas la realecon de tiu jeso, ĉar ili kredas ke "persono kiu parolas la internacian lingvon, estas sendube esperantisto". Tiuj ĉi sinjoroj tute ne scias, ke por esti vera esperantisto, ne sufiĉas paroli Esperanton pli aŭ malpli korekte. Ili devas scii ke por esti esperantisto necesas praktiki en ĉiu momento la "Ideon", kiel nia Majstro faris dum sia vivo.

Bedaŭrinde estas malmultaj veraj esperantistoj. Kontraŭe, estas multaj kiuj lernas la internacian lingvon "por pasigi la tempon". Por ili Esperanto estas nur alia lingvo.

Kiel eviti tiun malon?

La afero ŝajnas malfacila, sed mi kredas kontraŭe: "Estas sufiĉe por atingi nian celon, ke la instruistoj kaj la profesoroj lernigu Esperanton, ne kiel la plej solidan bazon por unuigi la popolojn, kiel la plej grandan malamikon de la milito, kiel la plej puran el ĉiuj ideoj".

Se vi instruistoj kaj profesoroj, faras tion, estu certaj ke Esperanton sukcesos, ĉar ĉiuj senescepte estos veraj apostoloj por disvastigi nian sanktan "Aferon".

EMILIO AYARZA.

Madrido.

EKSTERLANDAJ PAĜOJ

SVEDUJO

Kelkfoje estas konsiderata kiel lando, kiun travagas sovaĝaj ursoj kaj kie la vintro regas la tutan jaron. La mondhistorio prirakontas ankaŭ la glaciajn periodojn de la Skandinavia duoninsulo, kaj mi tute ne volas nei kion diras tiu grava verkaĵo. Se antaŭ miloj da jaroj ĉi tie regis tutjara vintro, ni tamen nuntempe havas kvar sezonojn, kiuj tre trafe montras al ni siajn trajtojn malgraŭ ke ilia aspekto tre varias. La politikuloj ofte asertas, ke la vetero plejofte estas komparebla kun la opinioj de iliaj kontraŭuloj. Se tiel estus mi tre bedaŭras ĉar la vetero de la kvar sezonoj estas tre ŝanĝema. Precipe la printempa vetero senĉese

varias; unutage brilas la suno el sennuba ĉielo, la aero estas varmega kaj la homoj sin vestas per someraj vestoj kredante ke jam estas alveninta la somero. Tamen oni devas esti tre singarda, ĉar baldaŭ povas malvarmigi la aeron la norda vento kaj ofte okazas ke eĉ falas el la ĉielo neĝeroj kaj la aspekto de la naturo igas nin pensi pri la malvarmegaj tagoj de la vintro. Sed tamen la kalendaro ne mensogas, kaj la unuan de Majo ni oficiale bonvenigas la printempon. Ne povas malhelpi la gloron de tiu tago ia ajn malbonega vetero. Unue ĝi estas la tago de la laboristaro, sed ĝi ankaŭ estas konsiderata kiel la tago en kiu naskiĝas novaj esperoj ĉe la homoj kaj vivigas ankaŭ la naturo, ĉar jam spiras kaj burĝonas la kreskaĵoj kaj la homoj multloke kaptas la okazon iri en la senbrujajn regionojn de la naturo, kiu tiom malavare favoras la svedan popolon. De mia fenestro mi rigardas la lagon, kies norda bordo limigas la sudan parton de la urbo. La akvo havas grizan koloron, ĝi aspektas malvarma sed tamen ĝia ĉarmo vekas la sentojn pri amuzigaj ekskursoj kaj marveturadoj al la insuloj, kiuj dum la somero aspektas kiel veraj perloj kaj donas al la vizitantoj veran senton de viveco, kaj kiam la arboj pere de la brilanta suno respeguliĝas en la lago oni vole nevole ekhavas klaran percepton pri la beleco de nia norda somero. Plue mi vidas la aeroplanojn, kiuj multope svingiĝas ĉiudirekten en la aero aŭ sin balancas sur la akvo de la lago. Oni diras tre prave ke nenie oni tiom entuziasme bonvenigas la someron kion en Svedujo. Kompare al la enloĝantoj Svedujo havas grandan areon, kaj de tio dependas la sovaĝeco, kiu distingas multajn partojn de la lando. Tiaj regionoj ofte restas sendifektaj de homaj manoj kaj pro tio estas pli allogaj ol la modernaj, praktike ordigitaj sed homplenaj urboj kaj vilaĝoj.

Dum lastaj jaroj oni tamen multe pli ol antaŭe propagandis la veron: "Konu vian landon". Kaj tre trafe oni aldonas: "Konigu vian landon". La ŝtataj kiel ankaŭ la kompaniaj fervojoj somere aranĝas ekskursojn en ĉiujn direktojn de la lando. Tio igas la homojn veturi kaj ĝenerale oni nuntempe instigas al vizito en lokojn, kiujn antaŭe ne ofte vizitis fremduloj. La rapidega disvolvigo de motoraj veturiloj devigis la fervojajn kompaniojn per speciale malkaraj kaj interesaj veturadoj logi la vojaĝantaron al la utiloj de fervoja veturado. La eksterlanda homo, kiu mem ne povas projekti aŭtomobilan veturadon tra Svedujo, ĉiam devas uzi la fervojon kaj alveninte Svedujon li unue petas informon pri la rondvojaĝoj, kiuj donas al la vojaĝanto rabaton je 30 ĝis 40 %. En la kadro de tiu ĉi artikolo oni ja ne detale povas priskribi tiujn rondvojaĝojn, kiuj altiras tre grandan intereson ĉe la svedanoj. La deziroj de la homoj ja tre varias, kaj kion iu opinias vidinda, alia homo tute ne ŝatas. Kiel vi ja certe scias Svedujo estas longoforma havante etendon laŭ sia plej granda dimensio. Eksterlanda vizitanto, kiu eniras la landon de sude, alvenas per tramo al Trelleborg, de kie li plej ofte rekte iras al la ĉefurbo de Svedujo. Se li havas sufiĉe bonan tempon li haltas en Malmö—urbo tre proksima al Trelleborg, kiun li devas trapasi—dum unu tago. La urbo havas 190,000 enloĝantojn kaj tie karakteriziĝas la moroj de la tipa popolo loĝanta en la plej suda provinco de Svedujo. Ilia lingvo tre diferencas tiun de la ceteraj provincoj kaj ofte oni

ŝerce konsideras la provincanojn eksterlandanoj. La urbo havas la plej artfaritajn havenojn en Svedujo kaj estas ĉefurbo de la provinco. Plue ĝi estas la plej homplena kaj la plej kulturita provinco de Svedujo. La historio priskribas kelkajn interbatalojn kontraŭ Germanujo kaj Danujo kaj kelkefoje eĉ apartenis la provinco al Danujo. Se vi estas esp-isto vi anoncas vian alvenon en la urbon kaj certe vi havos agrablan restadon en la koro de Skanio (La nomo de la provinco). Post la vizito en Malmö vi vagonare iras al Stockholmo. Kaj nun vi estas en la ĉefurbo de Svedujo kaj povas intime konatiĝi kun la vivo de la svedanoj en tiu interesa urbo. La plej amuziga tempo por vizito en Stockholmo estas en la fino de Julio aŭ en la komenco de Aŭgusto, ĉar tiam revenas al la urbo la urbanoj, kiuj dum la pli varma tempo feriiis kaj pro tio restis aliloke. La urbo estas duone ĉirkaŭfluita de riveroj kaj ligita kun la balta maro. Kiel ĉefurbo ĝi estas la centra punkto de la lando kaj al ĝi estas centrigitaj la pli gravaj industrioj kaj ceteraj por la lando mem kaj ĝia eksporto necesaj fabrikoj. Per la aranĝotaj esperantistaj kongresoj dum la jaroj 1933 kaj 1934 la svedanoj konigos sian ĉefurbon al granda internacia publiko, kiu tiam dum kelkaj tagoj povos ĝui la gastamon de la svedanoj. Vi eble demandas: "Ĉu Svedujo havas multajn vidindaĵojn? Ĉiu lando ja havas siajn specialajn trajtojn, sed konsiderante la situon de Svedujo ĝi tre allogas fremdulojn el ĉiu parto de la mondo. La fremdulo ĉiam demandas pri la noktmeza suno, ĉar ĝi ja estas fenomeno malofte. Sed tamen ĝi ne estas videbla en la mezo de Svedujo. Vi devas vojaĝi norden, kie dum la mezsomera tempo oni ne havas noktojn, ĉar la sunlumo ankaŭ heligas la noktojn. Ĉiu provinco tamen havas siajn plaĉojn. Se oni ŝatas la sovaĝan naturon kun altegaj montoj intermiksita kun la bruado de la riveregoj, kies sonoj estas aŭdeblaj tre malproksime, oni vizitas la nordan parton de Svedujo. Tie estas trovebla nemezureblaj arbaroj, kies sovaĝa aspekto kaj riĉeco je surprizaĵoj glorigas la ŝajne krudan kaj senfinan arbaregon. La nura turistoj tamen plej ofte restas pli suden, kie li povas ĝui kaj travivi sian liberan tempon kaj samtempe observi la karakterizajn trajtojn de la lando, sed kiu volas esplori la morojn de la plej norda parto, tiu iras plej norden, kie li trovas genton kiu apartenas al la sveda popolo, sed kies vivmaniero kaj lingvo apartigas ĝin de la sveda popolo. Ili bredas nordajn cervojn, kiuj en grandaj amasoj iras aŭ sur la montoj aŭ en la valoj. Plej ofte ilin sekvas paŝtisto, sed dum la vintro tamen estas tre malfacile por ili trovi nutraĵon kaj krom tio la bredado estas tre riskplena. La gazetoj multe rakontis pri la atakoj fare de la sovaĝaj lupoj, kiuj dum fortaj vintroj kiam estas tre malfacile trovi nutraĵon, postsekvas la brutaron. Atinginte ĝin, la kruelaj bestoj per sangantaj vundoj mortigas multajn el la brutaro kaj suĉas la sangon el la vejnoj de la bestoj. Poste ili satigas per la viando la malsategon. Nia norda lando estas plena je vidindaĵoj kaj enirinte ĝin vi trovos unue klarvidan kaj ĝentilan popolon, kiu rilate laŭ vigecon tamen ne estas komparebla kun tiu de pli sudaj popoloj, sed kiu anstataŭe kore akceptas la fremdulon kaj konsideras nepra honoro igi la viziton kiel eble plej riĉa je travivaĵoj.

MALFERMITA LETERO

Mia kara amiko:

Jam de longe estis mia sopiro povi aĉeti libron en kiu estus ĉiuj gvidiloj por trapasi la vivon tute kiel inda homo.

Feliĉe kaj post serĉi kaj serĉadi en publikaj bibliotekoj kaj librovendejoj, tia libro estis trovita. Mia kontento estis nepriskribebla ĉar pere de tia libro en kiu estas le plej ĉarmaj vortoj de la plej fanĝkonataj scienculoj kaj filozofoj oni povos iri ĉien kiel bonedukita persono. Ĉu vi volas scii kion diras tiaj senmortaj amikoj por ke ni estu kiel la homaro postulas de ni?

Jen:

Ĉiam mi kredis ke se oni refarus la edukon de la juneco, oni atingus refari la homaron.

La progreso estas kooperi: sen la konkurso de multaj homoj ĝi ne estus ebla.

Ne kontentiĝu laŭdante la bonfaremajn personojn: imitu ilin.

Estas la sama diferenco de scienculo al nesciantulo, kiel de vivanta homo al kadavro.

La klereco estas la bona eduko de la intelekto.

La vera hodiaŭa universitato estas kolekto da libroj.

Feliĉa kiu povas koni la kialon de la aĵoj!

Por la laboro tuta tago; por la sporto unu horo; por amiko la tuta vivo estas mallonga.

Vi devas forgesi la bonon faritan al alia kaj nur memori la ricevitan.

La libereco konsistas, povi agi ĉion kio ne estas malpermesata de la leĝoj.

Kiu ne povas kion li volas, volu kion li povas.

La karaktero estas la volo kulturata.

La honoro estas same kiel la neĝo; se ĝi perdas la blankecon ĝi jam ne plu estas reakirebla.

Ne ekzistas neeblo por laborema homo.

Unue laboru; ripozu poste.

Kiu atendas por fari multe samtempe, neniam faras ion.

La homoj havas en siaj propraj manoj la ilojn de sia riĉeco.

Trompon faras kiu ricevas kion li ne povas pagi.

Parolu por ke mi vidu vin.

Facilo kaj Serioceco de la Lingvo

Oni povas legi en grava, moderna esperanta verko:

“Vortklarigoj

vortoj ne registritaj en Plena Vortaro de S. A. T. plejparte estas troveblaj en vortaroj: (b): Boirac; (c): Christaller; (f): Fulcher-Long; (gm): Grosjean-Maupin; (g): Grabowski; (v): Verax; (w): Wuster; (z): Zamenhof; Vortoj kun (x) mankas al tiuj vortaroj; kelkaj (bohema, morna, sakri, sledo, stumbli, trista) estis jam plurfoje uzataj de bonaj verkistoj. Dek vortoj estas proponitaj en la Parnasa Gvidlibro.

Pri io netrovebla en la suba, oni rigardu sub Diversaj Klarigoj”.

Sekvas poste kvin paĝoj da klarigoj.

Ni opinias ke la aŭtoroj devis aldoni por kompletigi la aferon:

“Se malgraŭ ĉio ĉi oni ne komprenas ion, skribu min petante klarigojn nacilingve”.

RAMON DE SALAS.

Promesu malmulte kaj faru multe.

Bone, amiko. Ĉu vi jam legis kion tiuj senmortaj amikoj petas de ni?

Se ni volas aspekti kiel deĉaj personoj ni devas daŭrigi de nun tra tiu klara vojo. Nur kutimiĝi kaj poste ĉio estas facila.

Tra densa mallumo briletas la celo,
al kiu kuraĝe ni iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.

ESPERANTEMULO.

SCIIGOJ

En la lasta numero de “Nia Vivo”, sub la titolo “Sciigoj” oni presis noteton pri la vizito de S-ro Kreuz al Frateco; en la dua paragrafo aperis: “En Komercista Klubo, regalis lin” anstataŭ: “En Komercista Klubo S-ro Maynar, nia Honora Prezidanto kaj ankaŭ Prezidanto de tiu klubo, regalis lin...”

S-ro Mancheño policisto kaj esperantisto el Irún sendis al ni tre interesan verkon titolita: “Elementos de Cultura Física”. Ni legis ĝin kaj estas tre klara kaj interesa ĝia enhavo. Dankon.

Fidela uzanto de nia lingvo, la Lyon’a Foiro, preparante la propagandon por sia venonta kunveno (8-18. marto 1.934) ĵus eldonis novajn presaĵojn en Esperanto, nome: afiŝojn, sorbpaperojn, ilustritajn poŝtkartojn kaj sigelmorkojn. Post unu monato, la Lyon’a Foiro plie dissendos presitajn invitleterojn en Esperanto. Fine, la katalogo de ekspozantoj entenos, kiel kutime, esperantan tradukon de la ĉapitrotitoloj.

Kolekto de tiuj presaĵoj estos sendata al komercaj firmoj, delegitoj de U. E. A. kaj esperantistaj societoj kiuj petos ilin.

Skribu al S-ro Richard Levin, Propaganda Fakestro, Foire de Lyon, Rue Menestrier, LYON.

Ni daŭrigas la ricevadon de gratuloj pri la eksterordinara numero de “Nia Vivo” de S-roj: A. C. van Ingen el Roterdamo; A. Lauffer el Mainz, instruisto de 46 orfaj geinfanoj el Gratz, kiuj venis al nia lando post la milito; D. Viktorov Ĉewoviĉ, Prezidanto de l’Internacia Sekcio ĉe la Kieva Centra Domo de Klerigo, kiu dediĉis al ni versaĵojn en Ukrainja lingvo: “El Principado de Gijón; Gosta el Svedujo; Internacia Esperantisto Hejmo de Aspremont; F. Vilá el Barcelono; Vallojera el Madrido”.

Al ĉiuj ni dankegas iliajn gratulojn.

Rondeto “Esperanto kaj Paco” avertas al ĉiuj, kiuj petis glumarkoj, ke tiuj ĉi ne estas ankoraŭ pretaj pro malsaneco de la litografisto. Tuj kiam ili estos presitaj ni rapide dissendos ilin. Ni petegas al ĉiuj pardonon pro tiu prokrastigo.

Nia kara fratecano kaj kunlaboranto de “NIA VIVO” S-ro Miguel Sancho Izquierdo estis elektita Parlamenta Deputito. Ni tutkore gratulas lin.